

Mil unu noktoj kaj tagoj

Estis foje patrineto, kiu ĉiam finis siajn tagojn en la sama maniero: ŝi zorgis, ke ŝia sepjara infano brosu al si la dentojn, banu sin, viŝu sin, kombu sin, kaj sin vestu per blua piĝamo. Kun ĉio tio farita, ŝi kuŝigis lin sur la lito, proksimigis al lia kolo la dikan kovrilon el lano kaj, kliniĝinta sur li, adiaŭis lin per dolĉa kiso sur lia frunto. Post tia lasta kareso, tiu patrino restariĝis kaj direktis sin al la pordo de la ĉambro, sed tiam milda voĉo detenis ŝin kun la dekstra piedo jam sur la sojlo:

– Panjo, ĉu vi ne volas rakonti al mi historion?

– Kompreneble, amo mia! Kiun rakonton vi tamen volas, ke mi nun rakontu al vi ĉinokte?

– Pri Ogro, panjo...

La milda voĉo de la infaneto devigis ŝin turniĝi al la lito kaj sidiĝi sur ĝia rando, dum la filo etendis al ŝi siajn brakojn. En la duonombro de la ĉambro, la okuloj de la knabeto kaj tiuj de lia patrino estis lumaj lampetoj, kiuj sin direktis unuj al la aliaj. Manojn en la manoj, la patrino tiam komencis sian historion. Atentaj oreloj akompanis ŝian parolon.

Jen estas la historio, kiun la patrino elektis por sia infano en la hodiaŭa fino de tago:

UNU TAGO KAJ UNU RAKONTO

Estis foje Ogro, kiu ege afliktiĝis de tio, ke ĉiuj patrinoj timigis siajn infanojn per la terura minaco de la alveno de Ogro. Neniu el tiuj timigitaj infanoj tamen iam vidis ian Ogron, sed neniam unu el ili konsideris suspektinda la neniaman aperon de tiu granda teruriga minaco...

Unu el tiaj patrinoj iam ege malesperis, ĉar ŝia filino ne volas dormi. Jam la dekan fojon ŝi diris al sia infano:

– Kara, morgaŭ vi devas ellitiĝi frue por iri en la lernejon. Se vi ne dormos nun, certe vi dormos dum la lecionoj, kaj la instruistino prave riproĉos vin...

La filino respondis:

– Ho panjo, mi jam vokis la dormon, sed ĝi ne volas veni... Kie do ĝi estas, ke ĝi ne aŭdas mian peton?...

La patrino estis tre laca de la tuta laborata tago, sed ŝi ankoraŭ provis sukcesi trovi en sia brusto iom da forto por kelkaj vortoj:

– Ho mia ameto, vi tiel brue vokas la dormon, ke vi ne povas aŭskulti, ke la dormo vokas vin... Fermu la okulojn, kaj viajn fermitajn okulojn direktu al la plaĝo, de kie via patro ekiris fiŝkapti sur la vastan maron. Kaj premu la lipojn, kaj per viaj premitaj lipoj parolu al la ondoj, kiuj venas sunumi al si la dorson sur tiu sama plaĝo, de kie via patro ekiris fiŝkapti sur la vastan maron: unua ondo... dua ondo... tria ondo... Kiam vi finfine atingos la dudekan ondon, vi tuj endormiĝos...

La patrino eliris el la ĉambro, kaj la filino komencis vidi per fermitaj okuloj kaj paroli per premitaj lipoj:

– Unua ondo... dua ondo... tria ondo... kvara ondo... kvina ondo... sesa ondo... ... dek unua ondo...

Subite, la vico interrompiĝis:

– du... do...

Kaj ŝi ekdormis.

La nokto paŝis sen urĝo, kaj ĉio estis silento en la tuta domo. La knabino dormadis trankvila, sen bruaj spiroj kaj sen bluaj songoj. Tiam la absoluta silento estis rompita, kaj la knabino rigardas eksteren, sed vidas nenion, ĉar la kurtenoj estis tute kuntiritaj:

– Eble, tio estis la vento... sed ŝajne, ia mano frapas ĉe mia fenestro...

Apenaŭ ŝi ree endormiĝis, jen ŝi estis denove tuj vekita per ia bruo ĉe la fenestro:

– Ĉu tio estas vere la vento, kiu frapas ĉe la fenestro?...

Kaj ŝi ellitiĝas, kaj iras al la fenestro, ĉar ŝi estas kuraĝa virineto, kiu timas nenion, eĉ ne la Ogron, per kiu ŝia patrino ofte provas ŝin timigi... Kiam ŝi troviĝis apud la fenestro, ŝi disŝovis la kurtenojn, kaj denove rigardis eksteren, kaj nun ŝi vidas. Ne nur ŝi vidas, sed ŝi sentime rigardas:

– Pro Zamĉjo! Kies estas tiu fingro, kiu frapas ĉe la pordo, pli dika ol mia piedo?... Evidente, mi ne vekigis, kaj nur songas... Mi tute pravas, ke mi songas, ke mi vekigis, kaj iris al la fenestro, kaj vidis fingron pli dikan ol mia piedo...

La ekmiro de la knabino pligrandiĝis, kiam ŝi levis la okulojn, kaj vidis egegan kapon, pli grandan, ol la vasta krono de alta arbo. Kaj ŝi ne povis jam teni sin de la surprizo, kiam atingis ŝin vortoj kaj ridetoj, certe dampitaj por ne trarompi al ŝi la orelojn:

– Vi ne sonĝas!... La fingro estas mia, kaj ĝi estas granda, ĉar mi estas giganto... Kaj la fenestro ne dispeciĝis nur pro tio, ke mi frapetis kiel eble plej malpeze... Cetere, mi tute ne volis timigi vin, kvankam mi scias vin sentima.

– Ho! mi dankas vin por tia ĝentileco ne timigi min, kaj precipe ne surdigi min per pezaj frapoj ĉe la fenestro. Sed kiu vi estas, ho egegulo?

– Mi estas la Ogro, pri kiu via patrino parolas al vi kelkfoje...

– Ofte...

– Akceptita ĝustigo... Neniu tamen scias, kio estas Ogro, kaj kion Ogro faras, kiam li vizitas domon, kie estas timigita infano. Pro tio, ege nervozigas min tio, kion la patrinaj missufloras al siaj gefiloj pri mia plej ŝatata okupateco... manĝi infanojn!... kvazaŭ mi estus ia karnomanĝa giganto!

La knabino konfesis:

– Mi iras de surprizo al surprizo. La unua estas tio, ke vi ekzistas, kaj la dua, ke vi ne estas tia monstro, kia ĉiu vin imagas: karnovora kaj antropofaga!... Tamen, se vi parolas al mi la veron, kion do vi faras, kaj kial diskuras tra la mondo tiom misfamiga opinio pri vi?

Al la knabino vere ŝajnis, ke la Ogro singultis, antaŭ ol li parolis:

– La misopinio pri Ogroj venas de la tempo, kiam ni estis multaj, kaj la homoj persekutis nin kruele, enviaj pri nia granda kaj saĝo kaj timigitaj de nia forto kaj potenco... Ĉion malbonan ni faris, laŭ tio, kion ili diskonigis pri ni... Kompreneble, ni defendis nin, kaj la malamo kreskis kaj disvastiĝis tra ĉiuj vilaĝoj de la tuta mondo. Tiam, eble por venĝi sin, ili komencis mensogi, ke ni estas infanmanĝantaj gigantoj... La homoj venkis nin, sed la malnobliga kampanjo daŭras ĝis hodiaŭ. Ni longe suferis, kaj ankoraŭ suferas... Kaj nun, mia familio estas la sola resto de la antikva multgiganta

ograro. Nia ĉiama malforteco kuŝas en tio, ke ni apenaŭ povas nin defendi, sed ni neniam povas ataki: morti eble, sed mortigi maleble...

La knabino fariĝis tre malĝoja, kaj preskaŭ ploris:

– Mi forte bedaŭras, kara.

– Dankon, fraŭlino! Vi demandis, kion ni faras nun. Pli bone, kion mi faras nun, ĉar miaj infanoj estas tre malgrandaj. Nu, kiam mi vidas, ke unu el la hometoj montras profundan teruron pro la malhonestaj paroloj de sia patrino, mi aperas al tiu infano, kiu iom post iom akceptas mian ĉeeston, kaj eĉ konsentas iri ludi kun miaj infanoj dum kelkaj minutoj de sia nokto, kiu respondas al nia tago...

La knabino laŭdis la aktivecon de la Ogro:

– Vi estas heroo, kaj eĉ la plej granda el la herooj, ĉar vi neglektas la ofendojn, kiujn multaj faras kontraŭ vi. Sed mi havas dubon: se mi ne timas vin, kial vi aperas al mi?

– Ho! tio estas facile klarigebla. Jam pli ol unu fojon mi rigardis tra via fenestro, kaj mi malkovris, ke vi ne timas la Ogron. Kiam mi tion diris al miaj infanoj, ili ege surpriziĝis, kaj do deziris havi foton de vi. Sekve, se vi konsentas pri tio, mi fotos vin... Alian nokton mi revenos, kaj prenos vian subskribon... se tio ne ĝenos vin.

La knabino ridis, sed neis per la kapo:

– Ho ne... Mi estas en mia ĉifita rozkolora piĝamo, kaj miaj haroj estas tute taŭzigitaj de la dormo! En via foto mi do aperus malbela kaj senzorga! Kaj mi tute ne volas ŝajni tia por viaj infanoj, kiuj pro tiu foto neniam volus ludi kun mi.

– Ho ve! vi ege disrevigos miajn infanojn... Krome, vi estas bela je ĉia horo kaj en ĉia vesto. Cetere, memoru, ke Ogroj apartenas al primitiva gento: ni estas tiel vilaj,

ke ni iras nudaj, kaj neniam ni kombas nin... Tia, kia vi nun estas, vi aspektas por ni superrava!... Verŝajne, miaj infanoj trovos vin tre ĉarma ogrineto.

– Se estas tiel...

Kaj la Ogro fotis la knabinon:

– Mi dankas vin por via afableco komplezi al miaj infanoj.

– Ne dankinde, kara mia! Tute ne dankinde...

– Tre dankinde, kara ogrineto!

La adiaŭo estis renkontiĝo de okuloj kun promeso pri novaj renkontiĝoj. Kiam li fine retiriĝis, ŝi kuntiris la kurtenojn de la ĉambro, kaj revenis en la liton, kie ŝi tuj endormiĝis, kun rideto sur la vango:

– Ogro estas amiko!

La historio finiĝis, kaj la patrino sin direktis al sia filo:

– Nun, amata! ek al dormo... Bonan nokton, mia fileto!

– Bonan nokton, panjo. Sed kiel nomiĝas tiu kuraĝa knabino?

– Karolina. Dormu, kara!...

– Panjo, lasta demando: ĉu mi iam renkontiĝos kun Karolina?

– Certe, kara. Morgaŭ vi renkontiĝos kun ŝi sur la strato, kiam vi iros al la lernejo. Kaj atentu, ke vi ne falu.

Post tiuj vortoj, la patrino refoje proksimigis al lia kolo la dikan kovrilon el lano kaj, kliniĝinta sur li, denove adiaŭis lin per dolĉa kiso sur lia frunto. Post tia duafoje lasta kareso, ŝi restariĝis, direktis sin al la pordo de la ĉambro, malŝaltis la lumon, kaj eliris por meritita ripozo post longa laborado.

La sekvantan matenon, al la knabo ŝajnis, ke li vekigis nur kelkajn minutojn post sia ekdormo. Li pretigis sin, iris al la tablo, prenis rapidan matenmanĝon, kaj foriris en la lernejon, sen ia penso pri la historio, kiun lia patrino rakontis al li.

Sur la strato, li iris senzorge per tre neregulaj paŝoj: unu treto per la dekstra piedo sur la rando de la trotuaro kaj alia treto per la maldekstra piedo sur la rando de la strato. Pro tio, lia kapo jen leviĝis, jen malleviĝis: jen supren, jen malsupren. Tia irado igis lin pensi pri la lastaj vortoj de sia patrino:

– “Morgaŭ vi renkontiĝos kun ŝi sur la strato, kiam vi iros al la lernejo. Kaj atentu, ke vi ne falu!...” Kiel ŝi povis paroli pri nia renkontiĝo, kaj konsili al mi atenton, se ŝi tute ne sciis pri mia nuna irludo? Ĉu eble ŝi estas divenistino?...

Por ne fali, li ege atentis la straton kaj la trotuaron... kun tia singardo, ke li albatigis al knabineto, kiu iris senzorge per tre neregulaj paŝoj: unu treto per la maldekstra piedo sur la rando de la trotuaro kaj alia treto per la dekstra piedo sur la rando de la strato. Pro tio, ŝia kapo jen leviĝis, jen malleviĝis: jen supren, jen malsupren. La knabino ludis la saman irludon, kaj egale atentis la straton kaj la trotuaron... kun tia singardo, ke ŝi albatigis al la knabo, kiu ludis tiun saman irludon. La vortoj interkruciĝis:

- Pardonu min!
- Pardonu min!
- Nenal kaj ne menciinde!
- Nenal kaj ne menciinde!
- Tre menciinde!
- Tre menciinde!

La knabo tuj rekonsciiĝis, kaj pensis pri la fino de la historio, kiun lia patrino rakontis al li la lastan nokton:

– Certe vi nomiĝas Karolina, ĉu ne?

La certeco de la knabo mirigis la knabinon:

– Kiamaniere vi povas scii pri tio?

– Tio estas longa historio! Kaj nun mi iras en la lernejon. Ĉu ni povas renkontiĝi posttagmeze en ia loko?

– Domaĝe, ke mi havas miajn lecionojn posttagmeze... Nur sabaton.

– Nu, ne gravas. Ni renkontiĝos iam kaj ie. Sed mi estas scivola pri io...

– Do diru!

– Ĉu vi vere fariĝis amikino de la Ogro?

– Jes, li estas nun mia amiko, kaj li eĉ diris al mi, ke mi voku lin, se iam mi bezonos ion, ĉar li estas multpova.

– Ho se ankaŭ mi povus paroli al la Ogro!...

– Tio estas facila. Li diris, ke li ĉiam atentis pri hometoj, kiuj dum la nokto staras antaŭ la fenestro kun disŝovitaj kurtenoj. Kaj li venas pli rapide, se ili ploras...

– Mi do malfacile parolos kun li.

– Ne diru stultaĵon! Mi juĝas facile voki lin, kiel mi diris al vi.

– Viro ne ploras!... Cetere, mia dormo estas ŝtona kaj sensona. Mi kredas, ke eĉ kuglo kaj pafo ne sufiĉos por vekti min.

– Ho! mi forgesis demandi, kiel vi nomiĝas.

– Frederiko.

– Do ĝis, Freĉjo!

– Ĝis, Kanjo!

Kaj ili disiris. Tamen, ĉiu el ili estis certa, ke ili kreskos, kaj geedziĝos, kaj estos feliĉaj por ĉiam... en tre bela kastelo sur la pinto de monto, priplantita per vinberoj.

Kaj unuj post aliaj sekvis multego da rakontoj, ĉar en ĉiu tago ripetiĝis egala amoplena situacio de patrino, kiu enlitigas sian infanon, kaj de filo, kiu petas sian patrinon, ke ŝi rakontu al li historion. Kaj tio sama okazis dum semajnoj, dum monatoj kaj dum jaroj... Sento kara estas centjara!

Tiamaniere, la mateno pasis, dum li vizitis la lernejojn, kaj spektis la lecionojn. La posttagmezo pasis, dum li faris siajn lerneajn ekzercojn. La vespero pasis, dum li amuziĝis per la videoludo, se nur li sukcesis retiriĝi de antaŭ la komputilo... Kaj fine venis la nokto, kiam lia patrino refoje zorgis, ke ŝia okjara infano brosu al si la dentojn, banu sin, viŝu sin, kombu sin, kaj sin vestu per blua piĵamo. Kun ĉio tio farita, ŝi kuŝigis lin sur la lito, proksimigis al lia kolo la dikan kovrilon el lano kaj, kliniĝinta sur li, adiaŭis lin per dolĉa kiso sur lia frunto. Post tia lasta kareso, tiu patrino restariĝis kaj direktis sin al la pordo de la ĉambro, sed tiam milda voĉo detenis ŝin sur la sojlo:

– Panjo, ĉu vi ne volas rakonti al mi historion?

– Kompreneble, amo mia! Kiun rakonton vi tamen volas, ke mi nun rakontu al vi ĉinokte?

– Pri unu knabo, panjo...

La milda voĉo de la infaneto devigis ŝin turniĝi al la lito kaj sidiĝi sur ĝia rando, dum la filo etendis al ŝi siajn brakojn. En la duonombro de la ĉambro, la okuloj de la knabeto kaj tiuj de lia patrino estis lumaj lampetoj, kiuj sin direktis unuj al la aliaj. La patrino avertis sian filon:

– Nun mi rakontos al vi mallongan historion, ĉar estas jam tre malfrue, kaj la hieraŭa estis tro longa.

– Pri kio vi parolos, panjo?

– Pri senhalta kaj sencerba knabo...

– Ho panjo, vi ne pensas pri mi, ĉu ne?

– Senhalta vi estas, sed nur kelkfoje sencerba... Do, ne pri vi mi rakontos.

Manojn en la manoj, la patrino tiam komencis sian historion. Atentaj oreloj akompanis ŝian parolon.

Jen estas la historio, kiun la patrino elektis por rakonti al sia infano en la hodiaŭa fino de tago:

ALIA TAGO KAJ ALIA RAKONTO

Estis foje knabo tre petola, kiu ĉiam agis senhalta en siaj faraĉoj kaj sencerba por iliaj eblaj konsekvencoj. Lia korpo daŭre montris grandajn ruĝajn makulojn: tio estis nur la rezulto de aplikita merbromino sur la multaj gratoj kaj skrapoj, kiujn li ekhavis per siaj heroaĵoj... Kaj ĉio kontinuus egala, spite de la konsiloj kaj riproĉoj de lia patrino:

– Atentu, ke vi ne vundiĝu!...

Lia brusto kaj lia ventro, kaj liaj brakoj kaj liaj kruroj estas nun dolore raspitaj el lia lasta aventuro. Li estis grimpinta sur altan arbon, kies trunko tute ne estis glata, kiam lia patrino iris en la korton kaj vokis lin per fortaj krioj:

– Kamilo! via patro jam alvenis, kaj portis por vi biciklon...

Avida ricevi la donacatan biciklon kaj ekrajdi sur ĝi, li ĉirkaŭprenis la trunkon per siaj brakoj kaj kruroj, kaj lasis sin rapide malsupren gliti... Kompreneble, la arbo estis akra raspilo.

Plej malbone estis, se li troviĝis kun siaj kolegoj, precipe kun sia amiko Marko, kiu estis tiel freneza, kiel li. Ĉifoje, la tuta afero devenis de naiva konversacio, ĉar Marko diris al Kamilo:

– Ĉu vi ne volus lerni flugi?

- Mi ne estas pasero...
- Flugi per aviadilo, azeneto!
- Flugi, ne... Mi preferas lerni paraŝuti.

Kaj ili defiis unu la alian:

- Aviadilo...
- Paraŝuto...

Post momento, Kamilo proponis al Marko:

- Mi vetas, ke mi ĵetos min per paraŝuto pli frue, ol vi stiros aviadilon...
- Akceptite! Mi vetas lekbombonon.
- Akorde.

Marko iris al sia patro, kaj petis lin:

- Paĉjo, matrikulu min en aviadila lernejo. Mi volas esti aviadisto!

La patro ridis:

- Sesjaran knabon la aviadila lernejo tute ne akceptos... Vi havos tempon por tio en la estonteco, kara.
- Mi komprenas, sed mi perdos la veton, kiun mi vetis kun Kamilo...
- Kiu veto?
- Pri tio, kiu el ni la unua efektivigos sian deziron.
- Kion li volas fari?
- Sin ĵeti per paraŝuto.

– Ho ha... Ne zorgu pri tio! Li estas sepjara, kaj nenia lernejo akceptos lin por tia lernado. Sekve, la veto estos decidita post multaj jaroj.

Kaj Marko do forgesis pri la veto, kiun li vetis kun Kamilo, kaj komencis atendi la tempon pasi.

Ankaŭ Kamilo iris al sia patro, kaj petis lin:

– Paĉjo, matrikulu min en paraŝuta lernejo. Mi volas esti paraŝutisto!

La patro ridis:

– Sepjaran knabon la paraŝuta lernejo tute ne akceptos... Vi havos tempon por tio en la estonteco, kara.

– Mi komprenas, sed mi perdos la veton, kiun mi vetis kun Marko...

– Kiu veto?

– Pri tio, kiu el ni la unua efektivigos sian deziron.

– Kion li volas fari?

– Stiri aviadilon.

– Ho ha... Ne zorgu pri tio! Li estas sesjara, kaj nenia lernejo akceptos lin por tia lernado. Sekve, la veto estos decidita post multaj jaroj.

Se Marko forgesis pri la veto, tion ja ne faris Kamilo, kiu obstine kaj senfine pensis pri la veto, kiun ili vetis, kaj ĉiun minuton diris al si mem:

– Mi ne povas atendi tiom da tempo...

Kiam li revenis el la lernejo, li decidis iri en la flugokampon por paroli kun aviadistoj kaj paraŝutistoj, sed multe pli al la lastaj, ol al la unuaj... Li tamen devis resti

hejme, ĉar pluvis kaj diluvis dum la tuta posttagmezo. Malgraŭ la plua pluvo, li volis eliri, kaj malfermis la pordon, kiam lia patrino bremsis lin:

- Kien vi iras sub tia pluvo, Fredeto?
- Mi prenos ombrelon!
- Ne, ĉar mi ne volas, ke vi risku malvarmumi.

Kaj li restis hejme, sed enue li pensis:

- Patrinoj ĉion embarasas...

Tiam, ideo skuis lin:

- Ombrelo...

La pluvo – somera pluvo! – baldaŭ pasis, sed estis jam vespero, kaj la knabo devis atendi la sekvantan tagon, post siaj lecionoj. Neniam, la matena lernejo estis tiel longa kaj teda... Post horoj kaj horoj da afliktiĝo, ĉio finiĝis, kaj li revenis hejmen.

Li manĝis. Poste, serioze, li sidis ĉe sia skribotablo, kaj faris la ekzercojn, kiujn liaj instruistoj pasigis al li, sed proksima al li estis lia ombrelo, kiun li rigardis de tempo al tempo. Kun ĉio preta, li prenis la ombrelon sub la brakon, eliris al la korto, apogis ŝtupetaron al unu el la muroj de la domo, supreniris, kaj jen li staras sur la rando de la tegmento, apud la akvodefluilo.

Li rigardis dekstren kaj maldekstren. Tiam, li malfermis la ombrelon, kaj sin ĵetis en la aeron sub sia paraŝuto. Akuta kaj longa krio aŭdiĝis:

– **AAAAAJ**

Tio tamen ne estis la knabo, kiu kriis, sed la paraŝuto, kies feraj stangetoj renversiĝis supren en tia maniero, ke Kamilo falis sur la teron sen ia protekto, ĉar liaj manoj tenis nur bastonon... La krio estis tiel longa kaj akuta, ke ĝi vokis lian patrinon, kiu kuris alvarma. Kiam ŝi alvenis, ŝi vidis la infanon falinta kaj ĝemanta. Nur poste ŝi rimarkis la rompitan ombrelon.

Kamilo estis portita en hospitalon, kaj pri tio li memoris tutajn tri semajnojn, dum lia piedo restis engipsigita...

La historio finiĝis, kaj la patrino sin direktis al sia filo:

– Nun, amata! ek al dormo... Bonan nokton, mia fileto!

– Bonan nokton, panjo. Sed vi ne diris al mi, ĉu li venkis la veton, kiun li vetis je lekbombono kun sia amiko.

– Li venkis, kaj ricevis lekbombonon. Dormu, kara!...

– Panjo, lasta demando: ĉu la ombrelo povis esti riparata?

– Certe, kara. Morgaŭ vi sopiros pri ĝi, kiam vi estos sur la strato survoje al la lernejo. Kaj atentu, ke vin ne prenu pluvo.

Post tiuj vortoj, la patrino refoje proksimigis al lia kolo la dikan kovrilon el lano kaj, kliniĝinta sur li, denove adiaŭis lin per dolĉa kiso sur lia frunto. Post tia duafoje lasta kareso, ŝi restariĝis, direktis sin al la pordo de la ĉambro, malŝaltis la lumon, kaj eliris por meritita ripozo post longa laborado.

La sekvantan matenon, al la knabo ŝajnis, ke li vekigis nur kelkajn minutojn post sia ekdormo. Li pretigis sin, iris al la tablo, prenis rapidan matenmanĝon, kaj foriris en la lernejon, sen ia penso pri la historio, kiun lia patrino rakontis al li.

Kiam li alvenis en la lernejo, la suno estis jam kovrita de grizaj nuboj, kiujn li tamen tute preteratentis. La lecionoj de la mateno estis tiel interesaj, ke li bedaŭris, ke ili finiĝis: la tagmezo venis tro rapide, kaj jen li marŝas hejmen.

Sur la strato, li iris senzorge. Subite, komencas pluvi, kaj tio igis lin pensi pri la lastaj vortoj de sia patrino:

– “Morgaŭ vi sopiros pri ĝi, kiam vi estos sur la strato survoje post la lernejo. Kaj atentu, ke vin ne prenu pluvo!...” Kiel ŝi povis tion konsili al mi, se tiam ŝi tute ne sciis pri la hodiaŭa vetero, precipe ĉar la hieraŭa estis mirinde serena? Ĉu eble ŝi estas divenistino?...

Kaj li revenis hejmen tute malseka de la pluvo, kaj li grumblis:

– Kial mi ne prenis ombrelon, se tion sugestis al mi mia patrino?...

La posttagmezo pasis, dum li faris siajn lerneajn ekzercojn. La vespero pasis, dum li amuziĝis per la videoludo, se nur li sukcesis retiriĝi de antaŭ la komputilo... Kaj fine venis la nokto, kiam lia patrino refoje zorgis, ke ŝia okjara infano brosu al si la dentojn, banu sin, viŝu sin, kombu sin, kaj sin vestu per blua piĵamo. Kun ĉio tio farita, ŝi kuŝigis lin sur la lito, proksimigis al lia kolo la dikan kovrilon el lano kaj, kliniĝinta sur li, adiaŭis lin per dolĉa kiso sur lia frunto. Post tia lasta kareso, tiu patrino restariĝis kaj direktis sin al la pordo de la ĉambro, sed tiam milda voĉo detenis ŝin sur la sojlo:

– Panjo, ĉu vi ne volas rakonti al mi historion?

– Kompreneble, amo mia! Kiun rakonton vi tamen volas, ke mi nun rakontu al vi ĉinokte?

– Pri unu malriĉa familio, panjo...

La milda voĉo de la infaneto devigis ŝin turniĝi al la lito kaj sidiĝi sur ĝia rando, dum la filo etendis al ŝi siajn brakojn. En la duonombro de la ĉambro, la okuloj de la knabeto kaj tiuj de lia patrino estis lumaj lampetoj, kiuj sin direktis unuj al la aliaj.

Manojn en la manoj, la patrino tiam komencis sian historion. Atentaj oreloj akompanis ŝian parolon.

Jen estas la historio, kiun la patrino elektis por rakonti al sia infano en la hodiaŭa fino de tago:

SEKVANTA TAGO KAJ SEKVANTA RAKONTO

Estis foje malriĉa paro de sengrunduloj, kiuj havis du infanojn: la pli aĝa estis la okjara Johano, kaj la pli juna estis la sepjara Maria. Johano kaj Maria streĉe amis unu la alian, kaj pro tio ili restis ĉiam kunaj. Iliaj gepatroj estis terkulturistoj, sed mankis al ili unu loko, kiun ili povus priplanti, kaj nun ili vagas kaj serĉas, kie ili povos loĝi kaj kulturi. La tuta familio sekvis tra la strato sen ia senduba estonteco, kaj haltis dum la tago nur por la trinko kaj la manĝo kaj dum la nokto por la dormo. Ili vivis kompatindan vivon, ĉiam forpelataj de la bienoj, en kies randoj ili tendumis. La ĉiutagan panon ili perlaboris diversmaniere: unualoke, ili sarkis kaj hakis; dualoke, ili ĉasis kaj fiŝis; trialoke, ili faras aliajn laborojn... Aliloke, ili fastis. Cetere, fasto estis jam okazo ege kutima...

En tiu tago, ili restis apud la arbaro, kiu estas proksima al nia urbeto. La gepatroj dungigis ĉe benzinstacio, kaj ili devas lavi la aŭtojn, kiuj estas lasataj tie de iliaj posedantoj. El unu el tiuj veturiloj eliris knabino, kiu vidis Johanon kaj Marian, kaj tuj kuris al ili:

– Kion vi faras ĉi tie tute solaj? Ĉu vi eble atendas vian lavatan aŭton?

Johano kaj Maria laŭte ridis pro ŝia trompiĝo:

– Ho ne! Niaj gepatroj dungigis sin por aŭtolavado, kaj ni atendas, ĝis ili finos sian laboron.

– Mi estas Fernanda. Mia patro estas tie, kaj mi kredas, ke nun li parolas al viaj gepatroj, kiuj havas malsekajn tukojn en la manoj.

– Mi estas Maria, kaj mia frato estas Johano. Ni ĝojas koni vin.

– Ankaŭ mi ĝojas koni vin. Ĉu ni povas ludi kune?

Johano vidis, ke Maria kapjesas, kaj li do plej rapide prenis la parolon:

– Ni ne povas ludi, ĉar ni estas malsataj, kaj tial ni iros en la arbaron serĉi ian frukton por manĝi, eble ĉasi per mia ŝtonĵetileto, eble fiŝi per ŝia hoko.

Maria esprimis sian malaprobon:

– Ah...

Fernanda estis optimisma infano, kaj tuj ekkriis:

– Serĉi frukton en la arbaro estos agrable. Ĉu mi povas iri kun vi?

Ambaŭ tuj respondis:

– Kompreneble.

Kaj la trio ekiris!...Ili singarde paŝis sub grandaj folioj kaj inter densaj lianoj, rekte antaŭen, sed dikegaj trunkoj ilin ofte devojigis sen tio, ke ili konsciiĝis pri la devio. Jen Johano vidas grandan birdon, kiun li volis atingi per sia ĵetileto. Lia fratino tamen detenis lin:

– Ho ne!... Tia bela birdo ne povas esti mortigata!...

Al ŝia gesto pri kompatato li respondis:

– Vi volas nin mortigi per malsato...

Kaj ili pli kaj pli interniĝis en la arbaron, ĝis ili haltis ĉe la bordo de rivero. Dum Fernanda kaj Johano sidiĝis, la krurojn en la akvo kaj la piedojn en freneza danco, Maria serĉis apudan trankvilan kurbon de la rivero, kaj tie lancis sian hokon. Jen fiŝo ekmordis la logaĵon, kaj plej rapide ŝi suprentiris la hokon, de kiu pendis duonspana astjanakso. Vidinte ĝin, Johano tuj plendis:

– Ho ne!... Tia bela fiŝeto ne povas morti sufokata!...

Kaj li mem rapidis depreni ĝin de la hoko kaj reen ĵeti ĝin en la akvon, dum ŝi respondis al lia gesto pri kompatato:

– Vi volas nin mortigi per malsato...

Dume, Fernanda stariĝis, kaj rigardis ĉirkaŭen, de dekstre al maldekstre, kaj de maldekstre al dekstre, ĝis ŝi eksplodis per subita ĝojo:

– Jen bananarbo kun maturaj bananoj!!!

Kaj ili povis satiĝi per vegetarana manĝo, sed ili devis atente elekti tiujn, kiujn la birdoj lasis nebekitaj....

Post la abunda lunĉo, ili decidis reiri al la benzinstacio. Ili singarde retropaŝis sub grandaj folioj kaj inter densaj lianoj, rekte antaŭen, sed dikegaj trunkoj ilin ofte devojigis, ĉar ili tute forgesis, ĉu ili turniĝis dekstren aŭ maldekstren dum sia veno: fine, ili konsciiĝis pri tio, ke ili estas perditaj...

Kaj nun la tempo komencis pasi malrapide... Ili ne timis pri si mem, sed pri tiuj, kkuj ilin vane atendos:

– Kion pensos niaj gepatroj?!...

– Kion pensos mia patro?!...

Sufiĉe da tempo post la foriro de la infanoj, venis la lasta aŭto, ĝuste tiu de la patro de la knabino. Ĝin la dungitaj sengrunduloj fine bele pretigis, kaj ĝia posedanto vokis sian filinon:

– Fernanda!

Sed ŝi ne respondis.

– Fernanda!

Sed ŝi ne venis.

– FERNANDA!

Venkita de timo kaj ekstreme afliktita, ŝia patro iradis tien kaj reen, serĉadis ĉi kaj for, sed trovis nenian infanon: nenie li ŝin vidas... Tiam, li ekmemoris pri la gefiloj de la aŭtolavistoj, kaj demandis ilin:

– Kie estas viaj infanoj?

Alkutimiĝintaj al la longaj promenoj de siaj infanoj, ili tute ne zorgis pri tio, kie iliaj infanoj troviĝas, kaj ilia patro trankvile respondis al la nervoza patro de Fernanda:

– Ie tie...

Kaj fingris al la arbaro:

– Ili tuj revenos.

Sed ili ne revenis tuj, kaj la tempo komencis pasi malrapide... ĝis la nervoza patro blekis per granda kolero:

– La sengrunduloj ŝtelis mian filinon... Ili sendis siajn infanojn por forkapti ŝin... Ili estas kamuflitaj banditoj...

Tumulto estiĝis, kaj neniuj aŭskultis plu la parolojn de la sengrunduloj:

– Ni estas senkulpaj... Ili revenos, se ili estas kunaj!

Homamaso formiĝis, kaj malsamaj opinioj trakuris la spacon:

– Povas esti.

– Ne povas esti.

– Manĝas kaj trinkas en lunĉejo...

– Perdiĝis en la arbaro...

– Troviĝas en proksimaj magazenoj...

La krianta homamaso altiris la atenton de policano, kiu venis kun sia svingata kaprompilo:

– Kio okazas ĉi tie?

Diversorigina bruado respondis al li, kaj li devis blekegi:

– Unu post unu!...

Kaj li indikis la plej palan:

– Nun vi.

Kaj la patro de Fernanda ĉion rakontis al la policano, kiu do severe pridemandis la gepatrojn de Johano kaj Maria. La paro sin defendis:

– Ni estas homoj sen domo kaj sen grundo, malriĉaj, sed honestaj. Ni faris nenion kondamnindan, kaj niaj infanoj promenas, dum ni laboras. Plej certe, ili serĉas, kion manĝi... ĉar estas nun malfrue, kaj ni kaj ili ĝis nun nenion manĝis hodiaŭ...

Post la plendoj kaj protestoj de la senespera patro, la policano decidis konduki la paron al la policejo por pli detala enketo. Li prenis ilin por forkonduko al la policejo, kaj ĝuste kiam jen alvenas trio da infanoj, kiuj demandas:

– Kio okazas ĉi tie, policano?

Ĝenerala konsterno!... La patro kaj la gepatroj alkuras al ili: unu al la sia kaj du al la siaj. Senkulpigoj estas ĉiam vere nesufiĉaj, sed bonaj koroj ilin akceptas kaj priforgesas...

La patro kaj la gepatroj demandis la saman damandon:

– Kio okazis al vi?

Kaj al la sama demando venis kuna respondo de la tri fine alvenintaj infanoj:

– Ni perdiĝis en la arbaro!...

La scivolo de la multaj ĉirkaŭantoj estis satigita per la interkrozataj paroloj de la infanoj, kiujn mi preferas resumi ĉi tie: ĉasisto trovis ilin irantaj en larĝaj cirkloj, tamen gajaj kaj majaj inter ridoj kaj akridoj.

La historio finiĝis, kaj la patrino sin direktis al sia filo:

– Nun, amata! ek al dormo... Bonan nokton, mia fileto!

– Bonan nokton, panjo. Sed kiel nomiĝas la sengrunduloj?

– Ludoviko kaj Liana. Dormu, kara!...

– Panjo, lasta demando: ĉu mi iam renkontiĝos kun iliaj infanoj?

– Certe, kara. Morgaŭ vi renkontiĝos kun ili sur la strato, kiam vi iros al la lernejo. Kaj atentu, ke vi ne perdu viajn lecionojn.

Post tiuj vortoj, la patrino refoje proksimigis al lia kolo la dikan kovrilon el lano kaj, kliniĝinta sur li, denove adiaŭis lin per dolĉa kiso sur lia frunto. Post tia duafoje lasta kareso, ŝi restariĝis, direktis sin al la pordo de la ĉambro, malŝaltis la lumon, kaj eliris por meritita ripozo post longa laborado.

La sekvantan matenon, al la knabo ŝajnis, ke li vekigis nur kelkajn minutojn post sia ekdormo. Li pretigis sin, iris al la tablo, prenis rapidan matenmanĝon, kaj foriris en la lernejon, sen ia penso pri la historio, kiun lia patrino rakontis al li.

En la mezo de la vojo, li aŭdis la konversacion de trio da geknaboj:

– Ĉu ne vere, Johano?

– Tute vere, Fernanda.

Post tiaj paroloj, la knabo iris al la trio, indikis la duan knabinon, kaj diris al ŝi per simpatia voĉo:

– Vi nomiĝas Maria, ĉu ne?

Maria alarmiĝis:

– Mi ne konas vin...

Li ridetis:

– Mi tamen konas ne nur vin, sed ankaŭ vian fraton kaj lian amikinson.

– Ne nur lia ŝi estas, sed ankaŭ mia.

– Sed eble pli lia, ol via...

– Vi...

Fernanda intermetis sin en la konversacion:

– Eble tiu knabo vidis nin, kiam ni alvenis en la benzinstacio, kaj savis viajn gepatrojn de la polico...

Nun la citita knabo intermetis sin:

– Mi ne estis tie, sed mi sciiĝis pri via aventuro. Kaj nun mi volas demandi vin, kiel vi povis trovi la retrovojn.

– Nin renkontis ĉasisto... Pli bone ni iru en tiun apudan placon, kaj sidiĝu, ĉar la raporto estos longa... Nur la retrovo estis mallonga.

La invito por sidiĝi en la placo igis lin pensi pri la lastaj vortoj de sia patrino:

– “Morgaŭ vi renkontiĝos kun ili sur la strato, kiam vi iros al la lernejo. Kaj atentu, ke vi ne perdu viajn lecionojn.” Kiel ŝi povis paroli pri nia renkontiĝo, kaj konsili al mi atenton, se ŝi tute ne sciis pri ilia invito? Ĉu eble ŝi estas divenistino?...

Li do devis respondi al ili:

– Domaĝe, ke mi havas miajn lecionojn post...

Kaj li rigardis sian brakhorloĝon:

– ... dek minutoj... Nur sabaton.

– Nu, ne gravas. Ni renkontiĝos iam kaj ie.

La knabo do volis repreni sian vojon al la lernejo, sed tiam li estis haltigita de voko:

– He! mi forgesis demandi, kiel vi nomiĝas.

– Frederiko.

– Do ĝis, Freĉjo!

– Ĝis, karaj!

Kaj ili disiris. Tamen, ĉiu el ili estis certa, ke Johano kaj Fernanda kreskos, kaj geedziĝos, kaj estos feliĉaj por ĉiam... en tre bela kastelo sur la pinto de monto, priplantita per vinberoj.

La tempopaso en daŭra ĉaso de l' estonteco sen ia ĉeso rapidis for... Unu post alia pasis la tagoj... Unu post alia pasis la semajnoj... Unu post alia pasis la monatoj... Unu post alia pasis la jaroj... Kaj tagon post tago estis novaj historioj, ĉar ĉiun nokton ripetiĝis tiu sama okazaĵo plena de amo kaj karesmo: ĉiufoje, kiam la mallumo falis sur arbojn kaj tegmentojn, lia patrino refoje zorgis, ke ŝia nun pliaĝa infano brosu al si la dentojn, banu sin, viŝu sin, kombu sin, kaj sin vestu per blua piĵamo. Kun ĉio tio farita, ŝi kuŝigis lin sur la lito, proksimigis al lia kolo la dikan kovrilon el lano kaj, kliniĝinta sur li, adiaŭis lin per dolĉa kiso sur lia frunto. Post tia lasta kareso, tiu patrino restariĝis kaj direktis sin al la pordo de la ĉambro, sed tiam milda voĉo detenis ŝin sur la sojlo:

– Panjo, ĉu vi ne volas rakonti al mi historion?

– Kompreneble, amo mia! Kiun rakonton vi tamen volas, ke mi nun rakontu al vi ĉinokte?

– Pri laboristo, panjo...

La milda voĉo de la infaneto devigis ŝin turniĝi al la lito kaj sidiĝi sur ĝia rando, dum la filo etendis al ŝi siajn brakojn. En la duonombro de la ĉambro, la okuloj de la knabeto kaj tiuj de lia patrino estis lumaj lampetoj, kiuj sin direktis unuj al la aliaj. Manojn en la manoj, la patrino tiam komencis sian historion. Atentaj oreloj akompanis ŝian parolon.

Jen estas la historio, kiun la patrino elektis por rakonti al sia infano en la hodiaŭa fino de tago:

MILA TAGO KAJ MILA RAKONTO

Estis foje knabo, kiu havis avon kaj baptopatron, kiu laboris en la Leopoldina Fervojo, kaj devis ripari pontojn en iliaj difektitaj pecoj, krom skrapri kaj raspi kaj farbi ilin post ĉio tia. Sinĉjo Maksimiano estis klavisto: la pontoj ankoraŭ ekzistas, sed li kaj la nomo de lia laboro ne plu ekzistas. Dum la ferioj kaj en la fino de la semajnoj la klavisto ŝanĝis sian salajratan oficon: tiam li fariĝis lignaĵisto (la domo estis el ligno), li fariĝis forĝisto (la knabo ekfajrigis la forĝujon), li fariĝis meblisto (tabloj kaj seĝoj de la domo ne estis aĉetitaj), li fariĝis masonisto (la necesejo sin tenis per firmaj brikoj). Kaj ĉefe li fariĝis fiŝisto (li mem teksis la retojn kaj fabrikis la kudrilon por fari ilin).

Lia domo staris sur monteto en duobla terparcelo tute priplantita per oranĝarboj. La knabo adoris dormi en tiu lignodomo, ĉar li povis rigardi al la luno kaj al la steloj tra la truetoj inter la tabuletoj de la muro, ne tute randalrandaj... Ili palpebrumis al li, kaj ilin li komprenis per amo kaj karesemo, kian nur infano povas teni. Ĉiun dimancon, la knabo demandis de li la saman demandon:

– Bapĉjo, ĉu hodiaŭ ni iros prizorgi la oranĝarbojn kaj defendi ilin de iliaj malamikaj formikoj per veneno kaj rozumo?

La respondo estis ĉiam jesa:

– Evidente, amo mia!

Rozumo estis simpla cementa duontuba rado, kiu ĉirkaŭis la trunkon de ĉiu el la oranĝujoj... La knabo helpis al li sekigi la duontubojn de la multaj arboj, ilin atente repurigi kaj fine replenigi ilin per nova venenita akvo, sed kion li ja plej avidis, tio estis la oranĝaĵo, kiun lia avo kaj baptopatro – voĉjo kaj bapĉjo lin li nomis! – kutime kaj senescepte faris post la fino de la laboro: malvarma alvo el profunda puto, kiun li mem desuprigis, oranĝa suko, kiu taskis al lia voĉjo kaj bapĉjo, kaj multa, multa sukero... Post kiam li kreskis, li iam diris al mi, ke neniam plu li trovis tian bonan trinkaĵon, tiel bongustan kaj tiel bonodoran: ilin trinki ĉiam donas al li okazon por memorigi lin pri lia voĉjo kaj bapĉjo [voĉjo, kiam li prezentis lin, kaj bapĉjo, kiam li vokis lin]... Sapiro havas revenindajn bonajn guston kaj odoron!

Flanke de lia domo sin levis bela domo, tuta el brikoj: ĝi estis la domo de Sinĉjo Karlo, la najbaro, kiu estis direktoro de magazeno en la tiama ĉefurbo de Brazilo: vidvo ĉiam malĝoja kaj patro tro severa. Li foriris frue, kaj revenis malfrue, lasante la ĉion al la zorgo de la ĉarma knabineto Karla kaj de la petola knabo Marko. Ŝi laboris ene de la domo, kaj li zorgis pri ĉio ekstere, kaj precipe devis ĉiutage turni la krandon por plenigi la akvujojn sub la tegmento. Elektro estis lukso eĉ por Sinĉjo Karlo...

Unu vesperon – Sinĉjo Karlo revenis iom pli frue de sia laboro! – aŭdiĝis ploroj, krioj kaj dentogrincoj el la domo de la najbaro: tio estis la patro, kiu draŝis al la filo la dorson kaj la kruojn pro la malplena akvujo sub la tegmento... Avo kaj baptopatro kun nepo kaj baptofilo tuj ekkuris al la barilo el pikdratoj, kaj hurlis pli laŭte ol la ploroj, la krioj kaj la dentogrincoj de la knabo kaj la ploroj kaj la krioj de lia fratino... tiel laŭte, ke

la bruo tute haltigis Sinĉjon Karlo. Kaj lin ili demandis, kvankam ili jam sciis, pri kio temas:

– Kio okazas ĉi tie, Sinĉjo Karlo?

Ilia alveno interrompis la batadon, sed la ploroj pluis dum iom da tempo. Sinĉjo Karlo senkulpiĝis:

– Tiu fripono lasis nin sen akvo... Eĉ ne por purigi la dentojn! Li nur ludas futbalon sur la strato aŭ perdas la tempon per amindumo ie ajn en stratangulo... Li forgesas, ke mi laboras akre, kaj mi volas akvon por mia bano... Lia fratino laboras, kial ne li? Senkulpigu min, Sinĉjo Maksimiano! Tio tute ne okazis, kiam mia edzino...

Li estis interrompita de la veninta najbaro per sopiraj vortoj:

– Sinjo Anĝelina estis bona koro!

Knaboj tamen havas mallongan memoron...

Kelkajn tagojn poste, la nokto falis, kaj Marko alvenis per laŭta kuro kaj murmuro al la domo de la najbaro, kaj preskaŭ lasis la haŭton ĉe la pikdratoj de la barilo pro sia tro rapida transpaso:

– Sinjo Maksimiano, pro amo al Dio helpu min. Mi refoje ne plenigis la akvuĵon, kaj denove mia patro mortigos min per batoj...

– Ha ba, Marko. Vi bezonas ne pli ol unu horon por plenigi la akvuĵon kaj iom pli por purigi la terparcelon. Pensu bone, junulo. Vi havas sufiĉan tempon por neniumi ie kaj tie.

– Mi scias, pardonu... Mi ĵuras...

– Ne ĵuru... Lasu la tempon priĵuri!

Kaj komenciĝis nesana laboro por plenigi la akvuĵojn de Sinjo Karlo: de unu al alia fosto dormis trunko transirita per du feraj stangoj super la buŝo de la puto... Ĉirkaŭ la trunko estis ligita ŝnuro kun sitelo ĉe la pinto. Ĉiu el ili havis sian laboron:

Marko mallevis la sitelon ĝis la fundo de la puto, dek trri metrojn malproksima, poste ĝin levis, ĝin prenis kaj fine verŝis la akvon en alian sitelon. Tiun la avo portis al la alia terparcelo, kaj supreniris la ŝtupareton. La nepo ĝin kaptis, ĝin priverŝis en la akvuĵojn, kaj ĝin redonis al la avo. Tiu kuris revene al la puto, ĉe kiu jam estis alia plena sitelo... La bela knabineto Karla ne nur rigardis, sed precipe atentis, ĉu paĉjo revenas... Kvindek sitelojn poste, la tuta mondo estis gaja kaj feliĉa, sed ege laca, sed ne la knabineto: rigardo kaj atento ne estas peza kargo, sed kompleza...

Nur pri io la grupo ne atentis, sed tion Sinjo Karlo tuj memoris, kaj do demandis kun malfida vizaĝo:

– Kial la dratoj de la barilo estas tenataj ĉiuj en la alto, tiele streĉe etenditaj, ke ili preskaŭ disrompiĝas?

Estas evidente, ke viro, kiu estis klavisto, lignaĵisto, forĝisto, meblisto, masonisto kaj ĉefe fiŝisto, neniam sin ĝenus per tia stulta demando:

– Ah! Tio...

Kaj li sin direktis al la barilo, restis antaŭ Sinjo Karlo, haltinta en la alia flanko, kaj tuj ekpensis pri akceptinda klarigo:

– Mi bezonis helpon, kaj vokis vian filon. Mi tute ne volis lasi min kaj lin vundataj per tia pikdrato, kiun vi insistas restigi inter ni...

Kaj tio finiĝis sen ploro kaj boro, sed tia estis la unua kaj lasta mensogo, kiun la infano aŭdis lian voĉjon kaj bapĉjon eldiri... Kaj sen kaŝo kontraŭ draŝo, certe!

En unu el la sekvantaj dimanĉoj, Sinjo Maksimiano laboradis, segilon en la mano, kiam alvenis lia nepo, ĉiam scivola:

- Bapĉjo, kion vi faras?
- Boaton por fiŝado en la rivero...
- Bele, bapĉjo! Ĉu mi povos iri kune?
- Mi pensos pri tio tiam.
- Ĉu vi permesas al mi helpi?
- Kompreneble!

La unua dimanĉo lasis la tabulojn pretaj. La dua dimanĉo faris la tabulojn de la fundo. La tria dimanĉo vidis la tabulojn kurbigiti por la flankoj de la boato. La kvara dimanĉo bone ŝtopis la renkontiĝon de la tabuloj... Kaj fine la kvina dimanĉo farbis la boaton nigra kaj ruĝa, ĉar li vibrumis por la Futbala Flamengo el Rio, teamo de la ĉefurbo: obstina flamengano!

Kaj tiel naskiĝis la ruĝa-nigra!

Unu sabaton posttagmeze, Maksimiano kaj Karlo portis sur ĉaro la boaton al Rivero Sarapuio, proksima al Golfeto Gvanabara, kaj lasis ĝin ĉe amiko fiŝisto, kiu loĝis apud la akvo. Ili provis la boaton: aprobita. Kaj faris la unuan fiŝadon, kaj revenis kun barelo da fiŝoj, kelkaj ankoraŭ vivaj. La knabon sorĉis unu el ili, kaj li do prenis pelvon, plenigis ĝin per akvo, kaj metis tien la fiŝon, kiu tuj eknaĝis. La avo kaj baptopatro protestis:

– Ne faru tion, knabo. Tio estas dolĉa akvo, kaj tiu fiŝo vivas en sala: li tuj mortos iamaniere...

La knabo frapis per la piedo en malkonsento:

– Kial mortigi lin? Ĉu vi volos ankaŭ mortigi min?

Kiam la knabo rigardis la malĝojan vizagon de la baptopatro, kaj vidis ribelan larmon defali, li komprenis la azenaĵon, kiu li faris, kaj esploris:

– Pardonu min, bapĉjo!

Kaj li mem portis la fiŝon al la barelo. La pli belajn ili destinis al la pastro, kaj la aliajn al siaj tabloj kaj al tiuj de amikoj.

La unuan fojon, kiam la baptopatro kunirigis sian nepon, tio estis por alporti lignon hejmen per la ĉaro: kolektitaj branĉeroj estis malpli kostaj ol karbo por la fajrujo, kiun li mem masonis... Aha, mi ankaŭ forgesis diri, ke tio estis li mem, kiu faris la ĉaron, escepte de la radoj, kiujn li aĉetis. Ili tagmanĝis ĉe la amiko, kiu gardis la boaton: fiŝoj kaj farunaĵo, krom oranĝoj... La knabo helpis la avon kolekti la lignon ĉe la rando de la rivero. En la fino de la posttagmezo, la ĉaron jam ŝarĝita ĝis la kovrilo – senkulpigu min: ĝi ne havis kovrilon! – la baptopatro demandis:

– Ĉu vi volas resti ĉi tie kun li ĝis morgaŭ?

Lia timo donis la respondon, kiun la du amikoj aŭdis sen ia protesto:

– Ho ne... Mi revenas kun bapĉjo!

Kaj ili revenis, sed hejme li pentis, sed nur por aŭdi la ridon de la bapĉjo:

– Nun, estas malfrue...

La sekvantan tagon la avo iris sola al la amiko fiŝisto! Kaj sola restis pentoplena knabeto... ĉar lia avino kaj baptopatrino ne estis sufiĉa kompenso.

Lecionoj estas oferdonoj.

Kaj okazis alia sabato kun alia fiŝado. La knabo petis de li kuniri, kaj la avo konsentis, sed profitis la okazon iom pentigi lin:

– Vi tamen ne montros vin malkuraĝa, ĉu ne?!

Ili ekiris, alvenis, salutis la fiŝiston, prenis la boaton, kaj sin sendis al alfluanto de la rivero, kiu sin puŝis al la golfeto Gvanabara kelkajn kilometrojn for.

Kaj mi nun klarigu, kiamaniere ili fiŝis. La rivero, kiu kuris proksima jam al la maro, havis la tajdojn de la maro: ĉiun sesan horon ĝi supreniris du metrojn dum la fluso, kaj ĉiun sesan horon ĝi malsupreniris tiujn samajn du metrojn dum la refluso. Ĝia alfluanto havis la samajn altan kaj malaltan tajdojn de la maro. En la fino de la alta dum la nokto – meza nokto! – la knabo helpis sian avon bari la enfluejon de la alfluanto per du apudaj retoj: unu el grandaj maŝoj en la flanko de la alfluanto kaj alia el malgrandaj maŝoj en la flanko de la rivero. Nu, dum la fluso la fiŝoj naĝas enen de la alfluanto, kaj dum la refluso ili trovas truitan pordon, kiu tralastas nur la fiŝidojn... Kiam komenciĝas la refluso, la fiŝoj volas reveni tra la rivero en la maron: la malgrandaj sukcesas, sed la grandaj implikiĝas en la maŝoj de la unua reto aŭ restas pene naĝantaj sur la ŝlimo de la alfluanto... Tiam okazas ludo: manoj prenas ilin en la boaton!...

Avo kaj nepo etendis siajn retojn, kaj poste remis en la direkto de la fonto, kaj ju pli proksime de la elfluaĵo, des pli interplektiĝis la branĉoj de la randaj marĉaj plantoj, kaj ili kovris la akvon per verda volbo super la akvo. Tiam, lia avo levis la remilon por forpuŝi branĉon tro malaltan, kaj ho ve al vi en la boato!... Por ilia missorto, la remilo frakasis neston de krabroj, kiuj ekatakis la boaton. Fulme rapidaj, avo kaj nepo retopuŝis la akvojn per fortaj remoj, kaj liberiĝis de la danĝero...

La rivereto reflugis siajn akvojn, kaj la ŝlima fundo komencis aperi ĉi kaj for... Jen la horo denove transpasi la krabrojn kaj alveni al la retoj por ne perdi la nokton.

La avo rigardis la boaton, vidis la sakon por la fiŝoj, kaj parolis al la malgranda nepo:

– Lukas, eniru tien.

La nepo eniris, kaj la avo fermis la buŝon de la sako... Li enspiris plurfoje por kuraĝiĝi, portis la boaton al la mezo de la rivereto, kaj impulsis ĝin per perfortaj batoj, ĝis ili transpasis la furiozajn krabrojn. La vizaĝo pruvis la malvenkon de la fiŝisto: plena de pikoj... Tiu de la nepeto, senvunda!

La nombro de la fiŝoj kompensis la mordojn...

Kiam ili alvenis, kelkaj amikoj pli atendis la fiŝojn ol la fiŝistojn. Inter ili, Sinĉjo Karlo. La vizaĝo tuta mordita de la fiŝisto tamen tuj poste vekis ĉies scivolon, kaj la sama demando krozis la aerojn kun aliaj egalaj:

– Kio okazis?!

Kaj la maljuna fiŝisto rakontis tion, kio okazis, fiera pri la kuraĝo de la nepo, kiu remis meze de la kabra eksplodo. En tiu momento, ĉies okuloj sin turnis al la knabo, rekte kaj fikse rigardantaj al lia vizaĝo sen ia piko de krabro. Nenia demando estis necesa por postuli la respondon de la knabo:

– Mi venis ene de sako...

Tio estis vostvorto por Karlo, la galhumora najbaro, kiu frontis la amikon fiŝiston, kaj balancis la kapon kun muta riproĉo, tuj tradukata per ofendaj vortoj:

– Tio rezultas el konstanta cedo al ĉia volo de stulta bubo...

Feliĉe la fiŝoj kaptis ĉies atenton, kaj la ofendo restis sen resendo. La plej bonaj, kiel kutime, foriris al la paroĥestro...

Kiam la fiŝoj finiĝis, estis horo reveni al la rivero kaj al la alfluanto, ĝia rivereto... Ili piediris puŝante la ĉaron: la fiŝo do venis senpage, ĉar ĝi kostis nur ilian laboron. Jes, ilia: de Sinĉjo Maksimiano kaj Sinĉjo Karlo.

Mi ĉiam aŭdis diri, ke fulmo ne falas dufoje sur la saman lokon. En tiu fiŝado tamen ĝi falis duafoje sur la saman lokon... Kaj ne pro malbeno de la ensakigita knabo!

Ili ekiris, alvenis, salutis la fiŝiston, prenis la boaton, kaj sin sendis al la alfluanto de la rivero, kiu sin puŝis al la golfeto kelkajn kilometrojn for.

Maksimiano kaj Karlo etendis siajn retojn, kaj poste remis en la direkto de la fonto, kaj ju pli proksime de la elfluaĵo, des pli interplektiĝis la branĉoj de la randaj marĉaj plantoj, kaj ili kovris la akvon per verda volbo super la akvo. Tiam, Maksimiano levis la remilon por forpuŝi branĉon tro malaltan, kaj ho ve al vi en la boato!... Por ilia missorto, la remilo frakasis neston de krabroj, kiuj ekatakis la boaton. Fulme rapidaj, ili retropuŝis la akvojn per fortaj remoj, kaj liberiĝis de la danĝero...

La rivereto refluis siajn akvojn, kaj la ŝlima fundo komencis aperi ĉi kaj for... Jen la horo denove trapasi la krabrojn kaj alveni al la retoj por ne perdi la nokton. Ili impulsis la boaton kaj rekte transpasis la krabrojn.

Bedaŭrinde, la direktoro de la magazeno estis tro granda kaj tro dika por la sako...

La historio finiĝis, kaj la patrino sin direktis al sia filo:

- Nun, amata! ek al dormo... Bonan nokton, mia fileto!
- Bonan nokton, panjo. Sed kiel nomiĝas la bela knabineto kaj la kuraĝa knabo?
- Kaja kaj Viktor.
- Panjo, lasta demando: ĉu mi iam renkontiĝos kun ili?

– Certe, kara. Morgaŭ vi renkontiĝos kun ili sur la strato, kiam vi iros al la lernejo, sed iru kaj revenu kun viaj gantoj. Kaj atentu, kiam vi estos kunaj, kaj rigardos al tegmento de apuda domo.

Post tiuj vortoj, la patrino refoje proksimigis al lia kolo la dikan kovrilon el lano kaj, kliniĝinta sur li, denove adiaŭis lin per dolĉa kiso sur lia frunto. Post tia duafoje lasta kareso, ŝi restariĝis, direktis sin al la pordo de la ĉambro, malŝaltis la lumon, kaj eliris por meritita ripozo post longa laborado.

La sekvantan matenon, al la knabo ŝajnis, ke li vekigis nur kelkajn minutojn post sia ekdormo. Li pretigis sin, iris al la tablo, prenis rapidan matenmanĝon, kaj foriris en la lernejon, sen ia penso pri la historio, kiun lia patrino rakontis al li.

En la mezo de la vojo revene el la lernejo, li vidis knabon kaj knabinon rigardantaj supren. La knabo tenis en la manoj longan bambuon, kaj pikis per ĝi ion en la alto: tio estis kajto, firme kaptita ie sub la tegmento.

Frederiko pensis helpi, sed li tiam memoris pri la vortoj de sia patrino, atente levis la okulojn al la tegmento, kaj malkovris neston de krabroj, tie kaŝitan. Li vidis, kaj rapidis krei tri laŭtajn kriojn:

– Atentu!... Haltu!... Krabroj!...

Estis nur la ĝusta tempo por ĉies forkuro, tamen sufiĉa por eskapi sen ia piko, kvankam la krabroj estis vere furiozaj: tiaj ili ja estis... Kiam ili fine haltis por spiri, la knabineto diris:

– Koran dankon! Via krio savis nin.

– Ne dankinde, Kaja. Kaj vi devas esti Viktor, ĉu ne? Mia patrino parolis al mi pri vi du...

– Nu, bone! Kaj refojan dankon...

Kaj post mallonga interparolo ili disiris. Tamen, ĉiu el ili estis certa, ke Viktor kaj Kaja kreskos, kaj geedziĝos, kaj estos feliĉaj por ĉiam... en tre bela kastelo sur la pinto de monto, priplantita per oranĝarboj.

Revenante malrapide hejmen, Frederiko plurfoje diris de si al si mem:

– Kial ŝi povis sciiĝi pri la krabroj?! Jen eble ŝi estas divenistino...

Kaj la vespero pasis kaj lasis, dum li faris sian doman lecionon. Kaj venis la horo dormi, kiam la patrino zorgis, ke ŝia naŭjara infano brosu al si la dentojn, banu sin, viŝu sin, kombu sin, kaj sin vestu per blua piĝamo. Kun ĉio tio farita, ŝi kuŝigis lin sur la lito, proksimigis al lia kolo la dikan kovrilon el lano kaj, kliniĝinta sur li, adiaŭis lin per dolĉa kiso sur lia frunto. Post tia lasta kareso, tiu patrino restariĝis kaj direktis sin al la pordo de la ĉambro, sed tiam milda voĉo detenis ŝin kun la dekstra piedo sur la sojlo:

– Panjo, ĉu vi ne volas rakonti al mi historion?

– Kompreneble, amo mia! Kiun rakonton vi tamen volas, ke mi nun rakontu al vi ĉinokte?

– Pri bestoj, panjo...

La milda voĉo de la infaneto devigis ŝin turniĝi al la lito kaj sidiĝi sur ĝia rando, dum la filo etendis al ŝi siajn brakojn. En la duonombro de la ĉambro, la okuloj de la knabeto kaj tiuj de lia patrino estis lumaj lampetoj, kiuj sin direktis unuj al la aliaj, sed la knabo sentis ion diferencon, kaj plendis:

– Ho panjo, kial vi estas tiel malĝoja?

Lia patrino afektis ridi:

– Kiel mi povas esti malĝoja, se mi estas kun vi, kaj tuj rakontos al vi alian belan historion?...

Jen estas la historio, kiun la patrino elektis por rakonti al sia infano en la hodiaŭa fino de tago, sen ia atendo de lia respondo:

MIL-UNUA TAGO KAJ MIL-UNUA RAKONTO

Estis foje du landoj, kiujn dividis larĝa rivero kun furiozaj akvoj, plena de kaskadoj kaj kataraktoj, ĉe kiuj la ĉielarko venis dormiĝi... Dangĝeraj akvokirloj kaŝobservis la kuraĝulojn, kiuj aventuris transnaĝi de rando al rando aŭ tranaĝi rivermalsupren. La plej multaj restis por eterne ostoj sur ĝia fluejo...

En la dekstra bordo de la rivero estis grandaj kampoj kaj vastaj arbaroj, kiuj apartenis al la landoj de la hundoj kaj de la lupoj. La hundoj estis landanoj de Hundujo, kaj loĝis sur la kampoj, dum la lupoj estis landanoj de Lupujo, kaj loĝis en la arbaroj. La du gentoj, la hundoj kaj la lupoj, estis grandaj ĉasistoj, sed okazis kelkfoje, ke unuj persekutis la aliajn, kaj pro tio ili sin tenis en longlonga milito...

Foje, lacigita de la konstanta luktado, hundido diris al siaj gepatroj:

– Hundoj kaj lupoj estas kuzoj, sed ni batalas unuj kontraŭ la aliaj, sed neniuj scias pri la kaŭzoj de tiu stulta milito. Mi volas vojaĝi kaj trovi rimedon por venigi al ni la pacon!

Lia patrino ploretis, sed lia patro konsentis kun li:

– Nia milito estas abomeninda, kaj ĉion ni devas fari por ĝin fini. Iru do kun Zamĉjo, kaj revenu kun li kaj kun la solvo!

La hundido marŝis kaj marŝis dum pluraj tagoj, ĝis la kampoj kaj la arbaroj finiĝis. Subite, unu matenon, li troviĝis antaŭ bela vilaĝo.

Kaj tie la hundido haltis por momento!

En la maldekstra bordo de la rivero estis grandaj kampoj kaj vastaj arbaroj, kiuj apartenis al la landoj de la katoj kaj de la tigroj. La katoj estis landanoj de Katujo, kaj loĝis sur la kampoj, dum la tigroj estis landanoj de Tigrujo, kaj loĝis en la arbaroj. La du gentoj, la katoj kaj la tigroj, estis grandaj ĉasistoj, sed okazis kelkfoje, ke tigroj persekutis kaj mortigis la katojn, kaj la katoj devas sin teni en rokaj regionoj, kien la tigroj ne povas aliri...

Foje, lacigita de la konstanta luktado, katido diris al siaj gepatroj:

– Katoj kaj tigroj estas kuzoj, sed ni estas daŭre persekutataj kaj mortigataj de la tigroj, sed neniŭ scias pri la kaŭzoj de ilia stulta malamo. Mi volas vojaĝi kaj trovi rimedon por venigi al ni la pacon!

Lia patrino ploretis, sed lia patro konsentis kun li:

– Ilia genocido estas abomeninda, kaj ĉion ni devas fari por ĝin fini. Iru do kun Zamĉjo, kaj revenu kun li kaj kun la solvo!

La katido marŝis kaj marŝis dum pluraj tagoj, ĝis la kampoj kaj la arbaroj finiĝis. Tiam, unu matenon, li troviĝis antaŭ bela vilaĝo, kaj tuj sekvis laŭ tre longa grua strato, sur kiu multaj veturiloj...

– Pro Zamĉjo!

Tiun krion elgorĝigis la katido, dum li flanken saltis por ne esti puŝfaligata de durada veturilo, kiu rapidis ege ĉe la trotuaro, kie li iris... Lia salto transportis lin sur beston, kiun li estis vidinta neniam antaŭe en sia vivo, pli grandan ol li, kaj pli fortan, iel similan al tigreto, kiun li timis... Li do forkuris! La besto blekis, kaj iris post lin.

Kompreneble, tiu besto estis la hundido, kiu tute ne sciis, kial la alia animalo kuris for:

– Mi ne volis vundi lin, ĉar mi vidis, ke li estas racia animalo: ne pro alia motivo, li havas voston!...

Spite de tiuj vortoj dirataj per karesema voĉo, la katido kuris plejeble rapide, sed iom poste devis halti por preni spiron. La besto haltis apud li, simple rigardis lin tre longe, kaj fine parolis:

– Mi ne konas vin. Kiu vi estas?

La katido surpriziĝis, ĉar li aŭdis strangan nekonatan lingvon, sed li vidis, ke la besto ne estas agresema, kaj do respondis al li tre ĝentile kaj sen ia rapideco:

– Mo ne sabas voa lango...

En la kata lingvo, tio signifas: mi ne scias vian lingvon... Tion tamen nur poste la hundido komprenis.

Ankaŭ la hundido surpriziĝis, ĉar li aŭdis strangan nekonatan lingvon, sed li vidis, ke la besto ne estas agresema, kaj li provis komprenigi sin per gestoj. Li multfoje frapis sian dekstran flankon per la vosto, kaj plurfoje parolis forte kaj sen ia rapideco, kun eta silento post la unua vorto:

– Mi aŭ!... Mi aŭ!... Mi aŭ!... Mi aŭ!...

La katido ege miris pri tiu gesto. Post momento, li multfoje frapis sian dekstran flankon per la vosto, kaj plurfoje parolis forte kaj sen ia rapideco, kun eta silento post la unua vorto:

– Mo mi aŭ!... Mo mi aŭ!... Mo mi aŭ!... Mo mi aŭ!...

La hundido insistis:

– Mi aŭ!... Mi aŭ!... Mi aŭ!... Mi aŭ!...

Kaj la katido egale insistis:

– Mo mi aŭ!... Mo mi aŭ!... Mo mi aŭ!...

Granda ronko finis ilian gestadon. Tio estis la sama durada veturilo, kiu preterpasis ilin en sia reveno. La hundo tuj insultis ĝin:

– Aŭ!... aŭ!... aŭ!...

Tiam, la katido komprenis, ke la besto sin prezentis al li. Sekve, dum li fingromontris al ĝi, li parolis al li tre malrapide kaj kun longa halto post la unua vorto:

– Vo... aŭ!

Poste, fingromontrante al si mem, li plu parolis al li tre malrapide kaj kun longa halto post la unua vorto:

– Mo... mi aŭ!

La hundo tuj komprenis, kaj pruvis tion per sia respondo, dum ĝi fingromontris al la alia besto:

– Vi... mi aŭ!

Poste, fingromontrante al si mem:

– Mi... aŭ!

La katido nun reprenis la parolon:

– Mo vená di desproksima lande...

La hundido eksaltis de surprizo:

– Mi komprenas vin! Vi ĵus diris, ke vi venas de malproksima lando, ĉu ne? Vi tamen diris: mo ne sabas... Kio estas tio?

La katido iom pensis, kaj do fingromontris al sia kapo, kaj respondis:

– Mo sabas: mo habas in la kape.

La hundido ridetis:

– Ha! scii: havi en la kapo.

Kaj ili rapide amikiĝis. Post kelka tempo, la lingvo donis jam al ili nenian malfacilecon kompreni unu la alian. La hundido rakontis sian problemon al la katido, kaj la katido rakontis sian problemon al la hundido, kaj ili vidis, ke ili havas similan problemon: alporti la pacon al siaj landoj. Tamen, ili konis la problemon, sed ne konis la solvon. Unu demandis la alian:

– Kion ni faru?

Kaj ili trovis nenian respondon, kaj ege afliktiĝis pro tio, ĉar multaj el iliaj amikoj mortos, dum ili ne venos kun la solvo.

En tiu momento, knabo pasis preter ili, kaj la katido parolis al la hundido:

– Amiko, kial ni ne demandos tiun bestidon, kiu pasis preter ni? Eble ĝi havos ian sugeston por rimedi nian tragedion...

La hundido tute ne ŝatis tian proponon, kaj abrupte manifestis sian opozicion:

– Stultaĵo! Kian inteligentecon povas havi besto sen vosto?...

La katido insistis:

– Kion ni povos perdi?

La hundido ne volis lasi sin konvinkiĝi:

– Ĉu vi estas certa, ke ĝi kapablos kompreni nin? Eble, ĝi eĉ ne scias paroli...

– Ni provu.

Kaj ili kuris post la knabon. Atinginte lin, ili komenci iradi apud li: la hundido, dekstre, kaj la katido, maldekstre. La knabo, kiu tre amis la bestojn, kaj tial volis esti veterinaro, kiam li fariĝos granda, ridis al ili, kaj parolis:

– Ho! du belaj bestoj.

La hundido tuj bojis (tio estas: parolis):

– Mi ne estas besto!

Samtempe, la katido tuj miaŭis (tio estas: parolis):

– Mo non está bestje!

La knabo diris al si mem:

– Estas neeble. Mi songâs. Se vi ne estas bestoj, kio do vi estas?

La hundo respondis por ambaŭ:

– Kompreneble, animaloj. Ĉu vi jam vidis ian beston paroli?

– Neniam.

– Sekve, ni ne estas bestoj.

– Bona argumento. Mi akordas: vi ne estas bestoj. Sed kion vi faras en nia vilaĝo, kie hundoj kaj katoj estas ordinaraj malamikoj, kaj tute ne parolas?...

– Ni havas tragedian problemon. Se vi povos, bonvolu helpi nin!... Nia tuta popolo dankos vin por tio!

Kaj nun la katido rakontis al la knabo, kio okazas en Katujo kaj en Hundujo: la genocido en la unua lando, kaj la kruela milito en la dua. Nur en tiu momento, la knabo rekonis, ke la bestido, pardonu! la animaĵo parolas tiun strangan lingvon, pri kiu li iom studis en la lernejo. Li do parolis rekte al la katido:

– Vi parolas mortintan dialekton de nia lingvo Esperanto! Mi lernis iom pri ĝi antaŭ unu jaro.

La hundido defendis sian amikon:

– Kiel, mortinta? Li ĝin parolas!

La knabo gestis, ke tio ne gravas. Efektive, nur unu afero urĝis: trovi solvon por la premateco de la du landoj! Li pensis, kaj pensis, kaj pensis... Subite, liaj okuloj fariĝis lumaj, kaj li ĝoje ekkriis:

– Mi trovis! mi trovis!

La hundido kaj la katido eksaltis de kontenteco:

– Diru!

– Dikó!

Kaj li diris. La hundido kaj la katido trovis bonega la ideon, kiun la knabo klarigis al ili, kaj la trio tuj ekmarŝis al la alia flanko de la urbeto. Post kelkaj minutoj da piedirado, ili haltis antaŭ la granda pordego de publika ĝardeno, kiu estis malfermita: multaj homoj eniradis, multaj homoj eliradis.

Ili rigardis dekstren kaj maldekstren, ĉu estas tie soldatoj kaj gardostarantoj: ne estis... almenaŭ videblaj! Ili do eniris, kaj komencis serĉi. Post nelonge, ili trovis, sed la knabo diris:

– Plej bone estas, ke vi du iru tien solaj... Eble, mia ĉeesto povas esti malutila por via konversacio: pro timo al mi, li povas mutiĝi... Kaj zorgu, ke neniu vidu, kion vi faras, nek aŭdu, kion vi parolas...

Ili do iris solaj, kaj haltis... antaŭ la kaĝo de la leono. Efektive, ili estis en unu el la plej grandaj zooj de la regiono. Tien ili iris pro la propono de la knabo:

– La sola maniero fini la militon kaj la genocidon estas trovi leonon, kiu estas la reĝo de la bestoj: la plej forta, la plej kuraĝa, la plej inteligenta... Ni petu lin, ke li akompanu vin ĝis viaj landoj, kiuj povas fariĝi unu sola regno sub lia regado.

– Bona ideo!

Kaj tiun ideon ili nun plenumis...

La knabo adiaŭis la hundidon kaj la katidon, kiuj dankis lin por lia bona ideo:

– Ni faros tion, kion vi konsilis. Ni atendos la nokton por liberigi la leonon, al kiu ni jam rakontis, kio okazas en niaj landoj. Poste, ni tri iros al la domo de la zorganto, kaj la leono devigos lin malfermi la pordegon. Li timos, kaj evidente obeos... Morgaŭ matene, li devos klarigi, kial leono povis forkuri de sia kaĝo, kaj transsalti la altajn murojn de la zoo. La veron li certe ne diros: kiu kredus al li?...

Se ili tion bone deklaris, ili tion pli bone faris, kaj jen la leono troviĝis jam ekster la kaĝo kaj ekster la zoo, kaj ili ekiris al sia celo. La leono tamen tuj poste parolis al siaj du unuaj subuloj:

– Reĝo bezonas reĝinon, kaj mia edzino estis kaptita kune kun mi, sed disigita de mi per kruela ago de la ĉasistoj. Mi scias, kie ŝin ili unue lasis katenita por nur poste disponi pri mi. La ĉeesto de reĝino donas al la reĝo multe pli da povo. Krome, mi jam de nun volas pensi pri mia heredonto, ke la paco estu eterna en mia regno!

La trio do ekvojaĝis por la liberigo de la leonino, kaj ili alvenis al sia celo nur en la sekvanta vespero. Ili haltis en malluma punkto de la zoo, kaj sidiĝis por interkonsiliĝi pri la adoptota plano. Post multa pripenso kaj pli multa diskuto, la hundo fine eldiris sian opinion:

– Vi du eniru en la zoon kaj trovu la kaĝon, kie ŝi estas, dum mi restos gardostare. Se io alarma okazos, mi tion aŭos al vi.

La leono volis kontribui:

– Tie certe soldato gardostaras, kaj mi montros min al li.

La hundo kaj la kato ekkriis de timo:

– Tio ĉion ruinigos... Li vokos por helpo... kaj eble tuta armeo vin katenos, kaj ni restos sen ia leoneco por nia repaciĝo!...

La leono ridis:

– Mi scias, kion mi faras. Ne timu, amikoj.

La kato saltis al arbo, kaj de la arbo al la supro de la muro. Post kelkaj embarasoj, ankaŭ la leono sin trovis trans la muro. Ili kaŝe observis la tutan zoon, ĝis ili trovis la katenejon de la leonino. Ili aliris tien, sed jen la leonino vidis sian viron, kaj tuj malfermis grandan buŝon por pli granda bleko, kiun paralizis en ŝia gorĝo la surdeta peto de la leono:

– Amo, ŝŝ!...

Kaj samtempe akuteta peto de la kato:

– Ĉit!...

La leono kaj la kato iom distanciĝis de ŝia kaĝo, kaj sinsekve la leono malrapide proksimiĝis denove al la kaĝo per senzorga promenado, konforme al la plano, kiun li elpensis. Ili do havis la bonan ŝancon liberigi la estontan reĝinon, kaj kompreneble profitis de ĝi. La trio nun transsaltis la muron, vokis la hundon, kaj kuris for de la zoo.

Kiam ili estis jam en prudenta malproksimeco, la hundo cedis al sia scivolo:

– Kiel vi povis liberigi ŝin, amikoj?

La leonino respondis:

– Mia edzo estas inteligenta animalo. Li kvazaŭ promenis senzorga, kaj pasis ĝuste antaŭ la pordo de la domo de la gardanto de la zoo, direkte al mia kaĝo. Dume, la gardanto prenis armilon, kaj kuris al mia kaĝo, kies pordon li malfermis, dum li tenis min kvieta per akuta stango de longa bambuo, vera mortiga lanco... Li pensis verŝajne, ke mi timas tian pikilon, sed mi restis senmova laŭ la instruoj de mia edzo. Estas evidente, ke la gardanto volas enirigi la leonon en la kaĝon, kaj mi estis la allogaĵo. Efektive, li vidis la leonon proksimiĝi, kaj kredis lin sorĉita de mia beleco...

Kaj subite ŝi estis interrompita per la voĉo de la leono:

– Mia edzino estas tre modesta...

Post tia intertempo, ŝi daŭrigis:

– Vi pravas, kaj mi dankas, amata mia! Kiel mi parolis, li kredis lin sorĉita de mia beleco, kaj mallevis sian kanonon (por mi, tio estis kanono)... En tiu preciza momento, la kato saltis al lia dorso kun eligitaj ungoj, kiuj disŝiris lian veston, dum li falis sur la grundon, vizaĝaltere. Eble li svenis, ĉar ni povis trankvile eliri el la zoo...

Post iom da tempo, la kvaro alvenis sur la kampo de la milito, kaj ĉio okazis en tia maniero, kia la hundo kaj la kato ĝin imagis, kiam ili eliris peti helpon: du landoj fariĝis unu sola regno sub unu sola reĝo kaj sub unu sola reĝino!

Milito kaj genocido estis aferoj de la pasinteco. Nur la paco regis en tiu feliĉa kaj feliĉiga lando.

La historio finiĝis, kaj la patrino sin direktis al sia filo:

– Nun, amata! ek al dormo... Bonan nokton, mia fileto!

– Bonan nokton, panjo. Sed kiel nomiĝas tiu inteligenta knabo?

– Rikardo. Dormu, kara!...

– Panjo, lasta demando: ĉu mi iam renkontiĝos kun Rikardo?

– Ne, kara. Morgaŭ vi iros rekte en la lernejon, sed revenos iom pli frue. Mi mem renkontiĝos kun li sur la strato en la mezo de la mateno. Kaj atentu pri tiuj historioj, kiujn mi ekde longa tempo rakontas al vi. La nuna estis la lasta.

La knabo skuiĝis per esploro, kaj ŝajne lin frakasis mortiga doloro... sed tio estis li mem, kiu iam diris, ke viro ne ploras!... Li ne povis deteni sin de la demando:

– Kial, panjo?

Lia patrino sufokis la singulton, kiu volis supren el ŝia gorĝo:

– Tion vi scios morgaŭ, amata mia!

Post tiuj vortoj, la patrino refoje proksimiĝis al lia kolo la dikan kovrilon el lano kaj, kliniĝinta sur li, denove adiaŭis lin per dolĉa kiso sur lia frunto, pli longa ol neniam, kvazaŭ ĝi estus senfina... Post tia duafoje lasta kareso, ŝi restariĝis, direktis sin al la pordo de la ĉambro, malŝaltis la lumon, kaj eliris por meritita ripozo post longa

laborado. Post kelkaj horoj, ŝin kaj ŝian maltrankvilecon kaptis la dormo por la ŝtormo de missonĝoj pri mortoplongoj.

La sekvantan matenon, al la knabo ŝajnis, ke li vekigis nur kelkajn minutojn post sia ekdormo. Li pretigis sin, iris al la tablo, prenis rapidan matenmanĝon, kaj foriris en la lernejon, sen ia penso pri la historio, kiun lia patrino rakontis al li.

Li alvenis en la lernejo sen ia problemo, kaj atente spektis la lecionojn, sed jen alvenis pedelo, kiu ĉiam iras tien kaj reen en la koridoro de la klasĉambroj, proksimiĝas al la instruisto, kaj ion sekretas al li. Forirante, li ĵetis longan kaj seriozan rigardon al Frederiko.

Kiam la pordo fermiĝis, la instruisto vokas Frederikon:

– Frederiko, vi devas iri nun al la direktoro.

Li dankas sian instruiston, aliras al la pordo, ĝin malfermas, ĝin transpaŝas kaj ĝin fermas. Poste, enirinte en la ĉambron de la direktoro, li salutas lin, sed ege surpriziĝas de la serioza voĉo, per kiu li informas lin por lia ekmiro:

– Mi kondukos vin hejmen en mia aŭto. Vi estas bezonata tie.

Nur kiam li eniris en la aŭton, li memoris pri la parolo de la direktoro, kaj tio igis lin pensi pri la lastaj vortoj de sia patrino:

– “Morgaŭ vi iros rekte en la lernejon, sed revenos iom pli frue.” Kiel ŝi povis paroli pri mia pli frua foriro el la klasĉambro? Se ŝi estus dirinta al mi, ke mi estos kondukata de la direktoro, mi nomus ŝin sorĉistino... sed eble ŝi estas nur divenistino. Mi tamen forte esperas, ke ŝi mistrafos pri tio, ke la hieraŭa estos ŝia lasta rakonto al mi...

La direktoro haltigis la veturilon, malfermis la pordon, kaj la knabo eliris. Ĉe la sojlo de la enirpordo, li vidis, ke lia domo estas plena de amikoj kaj parencoj, kaj li pensis:

– Ĉu festeno?

Dum unu momento li haltis antaŭ la fermita pordo pro komprenebla hezito pri la nescio, kio okazas interne. Li tamen tuj eniris, kiam li aŭdis la nomon de sia patrino:

– Nun Sinnjo Magdalena...

Jam en la ĉambro, li vidis, ke ĉiuj subite eksilentis, kaj ankaŭ rimarkis la seriozajn vizaĝojn de la ĉeestantoj, kaj tuj konkludis al si mem:

– Ne festeno. Kio do estas?...

Tiam lia onklino proksimiĝis al li, preme brakumis lin, kaj plorsingultis:

– Ho kara, kia tragedio!

– Onjo, mi scias nenion. Kio okazis?...

– Mia fratino...

– Mia patrino... vi diras.

– Via patrino...

Kaj la ploro ne lasis ŝin paroli plu, kaj ŝia edzo rapidis al ŝi kun glaso da akvo kun sukero. Transdoninte la glason, li diris:

– Via patrino estas nun en la hospitalo, puŝpelita de kamiono. Sinnjo Magdalena estas grave vundita, kaj ni scias nenion plian. Via patro estas tie, kaj ĝis nun ni atendas sciigon pri ŝia stato.

La knabo ŝanceliĝis, kaj kvazaŭ svenis. Per surda voĉo li murmuris:

– Ho ve!... Ĉu ŝi mortos?...

– Jam de longaj horoj ŝi kuŝas en lito de la hospitalo... Verŝajne la kuracistoj nun operacias ŝin.

– Kiel tio povis okazi, se panjo estas tre singarda, kiam ŝi transiras straton, kaj ĉiam ĉe la signalilo?

– Tio ne estis ŝia kulpo, sed sola fatalo... Knabo transiradis la straton distrite, kaj venis rapide kamiono... Via patrino apenaŭ havis la tempon perforte puŝi lin antaŭen, sed ŝi mem estis trafita de la pezaj radoj... Heroino ŝi estas!

La knabo tiam dolore rememoris la vortojn de sia patrino:

– “Mi mem renkontiĝos kun li sur la strato en la mezo de la mateno.” Vera divenistino, ŝi diris, ke ŝi renkontiĝos kun la knabo, kaj efektive ŝi renkontiĝis kun Rikardo... la knabo de la bona ideo! Kaj ŝi sciis, kio okazos al ŝi, kaj pro tio, ŝi estis tiel malĝoja... Ho panjo amata!... Ne forlasu min nun. Via morto estos mia morto... Vivu por mi, patrino! Patrineto!...

La knabo supreniris al sia ĉambro, per malrapida mano disŝovis la kurtenojn, kaj staris kun la okuloj fiksitaj en la infinito. Ĉiufoje, kiam li palpebrumis, du larmoj ruliĝis malsupren... Kaj nur tiuj larmoj moviĝis antaŭ la malfermita fenestro.

La onklo parolis al li, kaj li ne respondis. La onklino proponis al li manĝon, kaj li rifuzis. Laciĝinta testudo, la posttagmezo pasis, kaj neniuj povis detiri lin de lia statua starado... Gluiĝa limako, la vespero pasis, kaj neniuj povis detiri lin de lia statua starado.

La domo fariĝis malplena: amikoj kaj parencoj, eliris unuj post aliaj... La lasta elirantino estis lia onklino, kiu promesis reveni en la frua mateno. La domo restis malplena: la knabo, staranta sen dormo ĉe la fenestro, kaj la servistino, kurbiĝinta sur sofo en laca dormo de laboro kaj doloro.

Li tamen restis sola kun sia senmoviga doloro...

La nokto plej densa falis sur la novan tagon, kaj la knabo restis senmova en la sama statua starado... Al lia kapo venis la vortoj de Karolina, la amikino de la Ogro, kaj li revidis ilian dialogon kaj sian arogantan opinion pri la ploro:

– “Ho se ankaŭ mi povus paroli al la Ogro!...

– Tio estas facila. Li diris, ke li ĉiam atentis pri hometoj, kiuj dum la nokto staras antaŭ la fenestro kun disŝovitaj kurtenoj. Kaj li venas pli rapide, se ili ploras...

– Mi do malfacile parolos kun li.

– Ne diru stultaĵon! Mi juĝas facile voki lin, kiel mi diris al vi.

– Viro ne ploras!...”

Ĉe tiu rememoro, la larmoj plej abunde sulkigis liajn vangojn, kaj li tremskue levis la kapon al la ĉielo, kvazaŭ la helpo povus pluvi de la alteco... Tiam, la vitroj de la fenestro ektintis per forta frapo de subita ventofajfo, kaj la noktan trankvilecon rompintis roza vortoĉeno:

– Frederiko, kial vi ploras?

La knabo mallevis la kapon, kaj radio da espero prilumis lian vizaĝon, kiam li ekvidis sian vizitanton:

– Vi venis, Ogro! Ogro, vi venis!... Vi vidis min, kaj vi venis!... Vi vidis min, kaj vi venis!... Ho vi!...

Meze de la ploroj kaj paroloj, inter spirhaltoj kaj korsaltoj pro puŝpejoj, li sciigis la Ogron pri la terura okazaĵo, kiu trafis lian patrinon. Kviete, la Ogro atendis la finon por ekstertempa moko:

– Nur tio?...

La knabo eksplodis per larmoj, sen ia kompreno pri la intencoj de la Ogro:

– Mia patrino mortas, Ogro...

– Estu kuraĝa, kaj atendu baldaŭan telefonalkvokon!

La Ogro pene eniris tra la fenestro, kaj sidigis la knabon sur la lito, kaj komencis paroli al li pri Karolina... Li aŭdis nenion, sed la varma voĉo de la Ogro iel mildigis lian malesperon. Post nelonge, la telefono sonis, kaj la knabo saltis al la telefonilo per kolosa nekredebla transsalto:

– Ha lo!

– Ho filo, ĉu vi ne dormas?

– Kiel mi dormus kun tia teruro pendanta super mia kapo? Ho patro, parolu al mi pri panjo!

– La kuracistoj diras, ke tio estas neebla, sed panjo estas nun ekster danĝero. Mi tamen scias, kio okazis: miraklo! Vi povos vidi ŝin morgaŭ matene. Mi nun revenos al ŝi. Amata mia, ĝis revido.

Demetinte la telefonilon sur la hokon, la knabo sin ĵetis al la Ogro, kaj brakumis lin per streĉita alkroĉiĝo:

– Dankon, koran dankon... Savinte mian patrinon, vi savis min de la morto. Mi tion neniam plu povos iam forgesi!... Ho dankon, koran dankon, bonkora amiko Ogro...

Dum li parolis, la Ogro trenis lin ĝis la lito. Alveninte tie kaj vidante, ke li dormas, la Ogro kuŝigis lin, proksimigis al lia kolo la dikan kovrilon el lano kaj, kliniĝinta sur li, adiaŭis lin per dolĉa kiso sur lia frunto: la milda kareso ne vekis lin, sed instinkte li brakumis sian novan amikon kaj savinton per forta ĉirkaŭpremo. Post tia lasta kareso, la Ogro ne facile restariĝis, firme direktis sin al la fenestro de la ĉambro, kaj tiam nenia voĉo detenis lin de lia foriro post lia lasta rigardo al la dormanto.

La sekvantan matenon, lia onklino revenis en la domon, supreniris al lia ĉambro, silente malfermis la pordon kaj eniris. Longan tempon ŝi staris senmova, senscia pri tio, kion fari...

Tiam, ŝi ĵetis amoplenan rigardon al sia nevo, kaj vidis lin dormanta kun kurbiĝintaj brakoj kaj interkruciĝintaj manoj, kvazaŭ li ankoraŭ brakumus amikon!...

Geraldo Mattos
Kuritiba, la 29-an de Novembro 1996